




Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place Gaston Pailhou
37000 Tours
esperanto-touraine37@wanadoo.fr
<https://esperanto-tours.legtux.org/>

Enhavtabelo	Paĝoj	LA KOMPLEKSO DE TETISO	
Pierrette legis la libron «La komplekso de Tetiso», kiun ŝi ege ŝatis. Por instigi nin al ties legado, ŝi faris mallongan prezenton. Tiu libro, kies temo estas la infana edukado, certe plaĉos al vi.	1 kaj 2	Verkita de Didier PLEUX (franca psikologo, doktoro en evolua psikologio) kaj publikigita en 2017 de la eldono Odile Jacob.	Tiu psikologia eseo pritraktas la novajn ĉiutagajn patologiojn observitajn.
Gérard kaj Jeannine tradukis artikolon aperintan en la revuo «La vie», kiu priskribas «Luma Arles», kutura eksperimenta centro plene dediĉita al la nuntempa arto.	2 3 kaj 4	Vi jam scias pri la komplekso de Edipo laŭ Freŭda teorio.	Ĉi tie D. Pleux faras okulsignon al Freŭdo pri la ama deziro de ĉiu infano por sia aliseksa parenco.
Ili ankaŭ donas al ni recepton de kukurba kaj juglanda kuko.	8	Kompreneble, li ne samopinias. Laŭ li, ekzistas certe deziro en ĉiu individuo sed temas pli pri serĉado, strebado al plezuroj diversaj (manĝaĵoj, hazardludoj, toksomanioj, sekso, povo, alkoholo...).	Tetiso, laŭ la greka mitologio estas diino forpelita de Zeŭso ĉar ŝi adultis. Li decidis, ke ĉiuj infanoj ŝiaj estos mortemaj. Por protekti siajn infanojn, Tetiso havis la ideon mergi ilin de naskiĝo en la nigrajn kaj frostajn akvojn de la rivero de la infero Stikso, rivero, kiu apartigas la mondon de la vivantoj kaj de la mortintoj kaj enhavas magiajn potencojn.
El la retejo short-edition.com tradukis Jean-Mary la mallongan rakonton «Flamrebato», kiu rememorigas al ni, kiu estis Jan Palach.	4 5 6 7 kaj 8		

Ĉapitro 1 : De Edipo ĝis Tetiso ; D. Pleux klarigas la du konceptojn

Ĉapitro 2 : Ĝia Moŝto de la bebotukoj ; La infano-reĝo

Ĉapitro 3 : La sovaĝa infano ; Lerni por lerni la vivon

Ĉapitro 4 : Mi plus Mi egalas Ni ; Pensi siajn agadojn

Ĉapitro 5 : La adolesko-reĝo ; Konstrui sian hedonismon

Resumo : Vivi nur laŭ sia plezuro maleblas. Tio ne estas la vivo.

Dezirante ĉiakoste faciligi, agrabligi la vivon de infano, ni misinstruas kiel alfronti la realon, la ĉiutagaĵojn. Infanoj iluziiĝas, missaĝumas.

Necesas plenigi la edukajn mankojn, lerni la akcepton de la realo, akcepti la devigon.

Konkludo : Trovi ekvilibron inter agrableco kaj malplaĉo por formi homojn pli rezistemajn al la hazardoj de la vivo.

Tiun legindan libron prezentis Pierrette.

LUMA, LA NOVA LUMTURO DE LA NUNTEMPA ARTO EN ARLES

La turo elpensita de la arkitekto Frank Gehry malfermis siajn pordojn al la vasta publiko somere 2021.


Estas la emblema konstruaĵo de Luma Arles, la kultura eksperimenta centro de la svisa mecenatino Maja Hoffman.

Tiun matenon, la turo de Luma Arles vekiĝas sub la mistrala blovo. Tiun vesperon, en la sunsubiro, ĝi brilos de mil fajroj. Tiu konstruaĵo, 56m alta estis elpensita de la arkitekto Frank Gehry, apostolo de la malkonstruismo. Do, vi ne retrovos tie la ordigitan raciecon de la modernismo, sed aliajn logikojn : eliĝante el vitra rotondo rememoriganta la arenojn de Arles, tiu konstruaĵo volas aspekti kiel la neregulaj klifoj de Alpilles. Ĝia garnaĵo de brikoj el neoksidebla ŝtalo, kiu reflektas la lumon, elvokas la peniktuŝojn de Van Gogh.

Ni eniras en la « *drum* », tiu vitra tamburforma cilindro, kiu konstituas la konstruaĵbazon. Ni vizitas ĝin, akompanate de Clara Yatim, unu el la mediaciantinoj de Luma Arles. « *Mia rolo estas teksu ligon kun la publiko, mallongigi la malproksimecon inter la artverko kaj ĝi* », eksplikas Clara.

Giganta tobogano

Kun nia gvidantino, ni surpréniras la unuajn ŝtupojn de monumenta, duoble revolua ŝtuparo. Levante la okulojn, ni estas surprizitaj per cirkla spegulo fiksita ĉe plafono kaj turnanta sur sia akso. Temas pri *Take Your Time*, instalaĵo de la plastikisto Olafur Eliasson. Alia allogaĵo en la enirejo : duobla metala tobogano de Carsten Höller, por kunligi la nivelon du kaj la bulvardan teretaĝon. « *Isometric Slides estas verko de sociala*



interagado proponanta alian transportrimedon, komentas Clara Yatim. La homoj adoras ĝin, ĉefe la infanoj ! »

En la orienta galerio de la bulvarda teretaĝo ni malkovras la ekspozicion *Tri generacioj : verkoj devenintaj el la verkaro de la Fondaĵo Emmanuel-Hoffmann*. Institucio, kiu portas la nomon de la avo de Maja Hoffmann, la fondintino de Luma Arles. Emanuel Hoffmann estis la filo de Fritz Hoffmann-La Roche, kreinto de la fama svisa farmacia laboratorio, kaj la patro de Luc Hoffmann, renoma ornitologo, kiu lanĉis en 1954 la biologian stacion de la Tour(turo) de Valat, en Kamargo. Tiu ekspozicio prezentas nun verkojn de pluraj avangardaj artistoj de la jaroj 1960, 1970, 1980 kaj 1990 : Bruce Nauman, Richard Long, Duane Michals, Cy Twombly, Alighiero Boetti kaj Rosemarie Trockel.



Post esti admirinta kelkajn verkojn, ek al la tursupro ! Bela surprizo atendas nin ĉirkaŭ la liftoj : muro el kamarga salo. « *Estas la frukto de iu projekto de nia ateliero Luma en Arles, eksplikas Clara Yatim. Tiuj nebruligeblaj muraj paneloj estas formitaj pere de la sala kristaligado sur metalaj kadroj el titano.* » Ni alvenas al la naŭa etaĝo, kie ni profitas de senegala panoramo : vido sur la ebenaĵo de Crau kaj sur la

Alpilles oriente, sur Rodano norde kaj sur la malnova urbo okcidente.

Dek-unu etaĝoj pli malsupre, ĉe la ĝardenata teretaĝo, ni jen estas en la ĉefa galerio : tiu de *The Impermanent Display*(« la efemera ekspozicio »). Ĝi prezentas tie verkojn de la Fondaĵo Luma, kiun Maja Hoffmann kreis en 2004 por subteni la nuntempan artan kreadon. Inter la instalaĵoj, la fotografioj, la skulptaĵoj kaj la pentraĵoj troviĝas pluraj kanapoj vestitaj el buntaj teksaĵoj : « *Estas verkoj de Franz West, indikas Clara Yatim. Tiuj kanapoj malkomfortaj estas kritiko de konsumada socio, kiu instigas nin akumuli pli kaj pli da objektoj por nia komforto.* » Meze de la galerio, verko de Urs Fisher altiras nian atenton : la vaksa reproduktaĵo de la *Enlèvement des Sabines* (la forpremo de la Sabinoj), skulptaĵo de Giambologna (1529-1608). La malrapida brulo de tiu monumenta kandelo volas esti esprimo de la vaneco de la surtera vivo.



REHABILITITAJ ATELIEROJ

Ni forlasas la konstruaĵon por reiri al la parko de la Atelieroj, preskaŭ 4hektara spaco. Konsistiga parto de Luma Arles, tiu pejzaĝa parko kaj ĝiaj historiaj konstruaĵoj estas la rehabilitado de forlasita industriejo de la SNCF : laborejoj, kiuj konstruis kaj riparis la lokomotivojn ĝis 1984, jaro de sia fermo. La totala kosto de la laboroj lanĉitaj en 2013 kaj financitaj de Maja Hoffmann sumas pli ol 180 milionojn da eŭroj, entenantaj la turon.



Ĉe ĝia piedo, sur verda gazono, rozkolora skulptaĵo, 13 metrojn alta, kreskis : *Krauses Gekröse*, enigma intesto de Frank West. Kelkajn metrojn pli fore, eleganta mozaïko de Kerstin Brätsh vestas la teron kaj plilongiĝas sur la muroj de la parkkafejo. Malantaŭ la konstruaĵo la Forges estas vera lageto, kiu kovras terenon, ankoraŭ nuda antaŭ nur 2 jaroj. Funde de la parko, pluraj grupetoj estas instalitaj surherbe. « *Estas sufiĉe neesperite trovi tiun tipon de loko en Arles, tio malvarmetigas la urbon* » plezuriĝas Mathieu, studento, kiu tagmanĝas ĉi tie kun 2 kamaradoj. « *La turo estas bela arkitektura defio, miksado de moderneco kaj de sobreco* ». Sur la alia lagetflanko Gabriele promenas kun amikino en la direkto de la Grande Halle, alia ekspozicejo. « *La turo similas al diamanto, entuziasmiĝas tiu germanino, kiu loĝas proksime de Baux-de-Provence. Tiu nova loko estas reala profito por la urbo Arles.* »

Post la traïro de la *Seven Sliding Doors Corridor* de Carsten Höller, ni laŭiras la konstruaĵon la ĝenerala Mekaniko. Ĉe ties ekstremaĵo troviĝas la ateliero Luma, unu el la Luma Arles programoj. En granda halo portata per finaj kaj nigraj kolonoj el ŝtalo laboras pluraj teamoj. « *Ni estas bio design lab (ekologia dezajna labo)*, eksplikas Caroline Bianco, asociita direktorino de la Luma ateliero. *Ni funkcias kiel laboratorio pri esploroj. La dezajno inklinigas nin al malsama rigardo pri la ĉirkaŭaj kaj sociaj temoj.* » Pluraj laboratoriaj kreaĵoj troviĝas en la turo : la muraj paneloj el salo, algaj pavimoj en la necesejoj, unu muro el sunfloroj kaj unu tapeto en la Drum Kafejo, sen forgesi la uzon de nekutima miksado de betono kaj salo. Naturaj, novigaj materioj ellaboritaj el regionaj riĉfontoj kaj, kiuj estas destinitaj al uzo de aliaj agantoj.



Nun estas tempo por forlasi Luma Arles. Sed ni revenos por malkovri aliajn ekspoziciojn. « *Ĉe Luma Arles, iuj restas 5 minutojn, aliaj 3 tagojn*, konstatas Caroline Bianco. *Estas individua libereco. Ni ne deziras, ke ĉiuj travivas la saman sperton.* »

Tiun tekston de Luc Perin el la revuo «*la vie* (oktobro 2021)» esperantigis Gérard kaj Jeannine.

FLAMREBATO

de Raginel

Jan Palach. Estas la nomo de la ulo, pri kiu S-ro Bastiano, la instruisto pri historio, volas, ke ni faru serĉon. Li asertas, ke necesas scii, kiu estis tiu ulo kaj tion, kio igis lin fama por kompreni la periodon de la malvarma milito.

Ankoraŭ tri rememorigaj leteroj : nepagitaj fakturoj. Ulo jam venis alian tagon por haltigi la gaso-kaj elektroliveradon. Li foriris, ne havinte sufiĉe da kuraĝo por plenumi sian taskaĉon. Pli ĝuste li kuraĝis ne fari tion. Mi ne estus surprizata, se li suferus malagrablajn konsekvencojn pro tio. Kapuĉa Robĉjo ne vere plu estas en la ideoj de nia tempo.

La instruisto asertas, ke la historio helpas al la malĉifro de la novaĵoj, ke ĝi povas eviti fali en la samajn kaptilojn kiel la plejaĝuloj. Stranga estas S-ro Bastiano. Li ŝajnas malpli elrevigita ol siaj kolegoj. Kiam oni semas malordon en lia klaso, li restas kvietita, eldiras al ni du aŭ tri fiŝercojn sen malico. Rezultas, ke oni fine kvietiĝas antaŭ ol lasi sin forporti de lia parolado. Li kapablas surprizi nin, malstabiligi nin. Oni neniam scias, kion atendi de li. Li eĉ sukcesas doni al ni moralinstruon tiel, ke oni nenion rimarkas. Poste iuj el liaj frazoj revenas en nian

memoron kaj pripensigas nin. Mi certas, ke lia afero pri Jan Palach estas samspeca : ruzaĵo, por pripensigi nin.

Mi estas laca pro la senfinaj monatoj, la rememorigaj leteroj, la minacavertoj de la regio pro la nepagitaj luprezoj. Mi eĉ ne plu havas koleron en mi. Tro da homoj, kontraŭ kiuj rankori. Alian tagon mi aŭdis la ministron en la radioaparato : laŭ li, la assistado estas la kancero de la socio. Kaj li daŭrigis la paroladon kun la refreno pri la laborvaloro. Nur pri tio temas de kelka tempo !

La laboro ? Mi scias, dankon! Mi leviĝas je la sesa horo ĉiumatene, eltenas unu horon da TER (*1), lasas miajn tri bubojn prepari sin solaj por iri al la lernejo, kaj kial daŭrigi ĉion tion, dum mi ricevas dum sep horoj la senbridan agresemon de miaj samspeculoj ofendegataj de la sorto, kiu estas destinata al ili en la urĝejo de la hospitalo, kie mi laboras kiel sekretariino ekde la forpaso de mia edzo. Vojakcidento. Viktimo kaj kulpulo. Alkoholo, rapideco, platano. Kvar jaroj estos pasintaj venontmonate. Vivakcidento, kiel diratas en la radioaparato. Assistado, vivakcidento, laborvaloro : mi estas vera kolekto da etiketoj per mi mem !

La momento estas maloportuna, por restadi en la salono. La etoso estas elektra. Sur la malalta tablo kuŝas la registrita letero, kiu ĵus konfirmis la suspendon de mia patro. Kvindek tagoj. Oni riproĉas lin, ke li ne obeis la ordonojn de sia estraro. Li havas mienon de malbonaj tagoj. Tamen, se oni bone rigardas lin, li elmontras subrideton, samtempe fieraj kaj ironia.

Antaŭ ol izoliĝi en mia dormoĉambro, por kolekti interrete informojn pri Jan Palach, mi bezonas scii, kiel li eltenas la baton :

— Paĉjo.

— Jes ?

— Mi volis, ke vi sciu. Panjo diris al mi pri via laboro. Mi ne scias, pri kio ili riproĉas vin, sed mi certas, ke tio estas granda maljustaĵo.

— Mi simple kredas, ke tiu laboro ne taŭgas por mi. Mi estas teknikisto. Ne ŝuldokolektisto.

Li denove direktas sian vidon sur la leteron, kiun li prenas en sia maldekstra mano, antaŭ ol senhaste refaldi ĝin, por ŝovi ĝin en la tirkeston de la malalta tablo. Parolante al si mem, perdiĝante en siaj pensoj, li aldiris en elspiro :

— Vere necesas, ke mi trovu alian laboron. Mia patro estas pli tuŝita ol li volas montri. Mallibera pro mia adoleskanta diskreteco, mi sentas min nekapabla alporti al li la plej malgrandan kuraĝigon. Mi retiriĝas.

— Ĝis baldaŭ, paĉjo. Mi devas serĉi ion en la reto.

Panjo surmetas sian manon sur la ŝultron de paĉjo. Li reparolas kapkline.

— Sen salajro. Mi bedaŭras, Helena.

— Oni elturniĝos. Ne maltrankviliĝu pro tio. Oni ĉiamaniere eliros el tiu malfacilaĵo. Mi estas fieraj pri vi. Ankaŭ via filo, kredu min.

Ŝi pravas.

— Mi solvis nenion. Mi metis nin en komplikegan situacion kaj mi solvis nenion por tiuj homoj. Lia voĉo rompiĝas kiel la vitro de ampolo ĉe ĉiu frazfino.

— Post kelkaj tagoj kolego iros fari tiun laboraĉon kaj neniu estos gajninta el tiu afero.


Dum mi sidiĝas antaŭ la ekranon de mia komputilo, la paroloj de miaj gepatroj mallaŭte alvenas al mi. Hejmpaĝo. Mi entajpas la nomon « Jan Palach » en la serĉadolangeton. Mi aŭdas mian patrinon, kiu maltrankviligas, kiel ĉiam : ŝia salajro estas alta... kaj morgaŭ ŝi povus tamen iomete paroli pri la situacio kun la urbestro, post la kunveno antaŭvidita por la fino de la antaŭtagmezo. Eble li havos ion por proponi al ŝi. Mi ne volas tion, diras mia patro. Kial ne ? Mi ne volas. La debato estas finita.

Ankoraŭ rapide pasinta vespero. En la trajno, hejmenveturante, mi jam sentas, ke la kontentigo esti fininta mian labortagon nuanciĝas de iom da kulpiga antaŭtimo samtempe, kiam alproksimiĝas la vespero, kiu preciziĝas. Mi malpacience deziras rekuniĝi kun miaj infanoj, kaj samtempe mi estas tro laca, tro premata de mia seninteresa ĉiutaga vivo por havi plezuron en la kundivido de tiuj momentoj kun ili. Alvenante, kiel ĉiuvespere, mi faras tiel, ke la farendaĵoj okazas pli rapide : hejmtaskoj, duŝoj, manĝoj, enlitigo. La kareso vera estas ankoraŭ prokrastita ĝis la morgaŭo. Promesite !

Mi flankenlasis wikipedion. S-ro Bastiano ne toleras ĝin. Li tuj malkovrus la trompon. Laŭ mia patrino veninta por scii, ĉu mi ne tro maltrankviliĝas pri paĉjo, tiu Jan Palach estis menciita en ĉiuj libroj pri historio en la tempo, kiam ŝi estis liceanino. Ne plu nun. Ŝi kunportis por mi la familian enciklopedion. Aĵo, kiu ricevas polvon sur la supra breto de la biblioteko inter malnova Bescherelle (*2) kaj « la herbario pri parkoj kaj arbaroj », kiu ravis min, kiam mi estis knabo. Mi ne volas ofendi mian patrinon. Mi atendas ĝis ŝi forlasos mian ĉambron por refermi la Larousse (*3) kaj reveni al Google.

Sola, fine aŭ jam, mi ne scias. Mi plenigas al mi lastan glason da malmultekosta ĝino... antaŭ la venonta. La unua el miaj du ĉiutagaj anasteziloj. La alian, la benzodiazepinon ŝtelitan en la malsanulejo mi glutos enlitiĝante. La televido : ĉiam la samaj stultaĵoj. Vekiĝante morgaŭ, mi ne memoros, kion mi spektis. Feliĉe ! Ankoraŭ unu glason. Mi ekdronas. Sonoj kaj bildoj malklariĝas en vomiga kaĉo. Ne plu bruas en la koridoro. Miaj infanoj dormas. Mi pensas pri tio, kio estus ilia vivo sen mi. Ne devige pli bona. Ne tiom malbona. Kiel scii ?

Mi fine trovis retejon bone dokumentitan pri Jan Palach. Mi kredas, ke mi eksciis la plejgravaĵon. Ĉeĥa studento de la fakultato pri beletro en la universitato Karlo en Prago, li mortigis sin per la fajro la 16an de januaro sur la placo Venceslas, centre de la ĉeĥa ĉefurbo, meze de la tago, antaŭ multaj pasantoj konsternitaj de la spektaklo de tiu homa torĉo. Brulante li transsaltis la barieron lokitan borde de la trotuaro antaŭ la nacia muzeo. Li hastis sur la veturejon kaj kuris sur la tramvojo, kiu supreniris de la malsupro de la placo Venceslas al la muzeo. Laŭ la retejo, kiun mi konsultis, li volis, ke lia ago veku la konscion de liaj samlandanoj ses monatojn post invado de ĉeĥoslovakio fare de la sovetiaj tankoj en aŭgusto 1968. Neimagebla ago, kun kolosa simbola trafpo vo kaj planeda efiko.



Jan Palach memormonumento en Prago

la

Mi estas venigita al la urbodomo sabate antaŭtagmeze. Logike : de tri semajnoj mi ne pagis la lernejan restoracion. Mi ne povus elteni novan moralan instruon. Ankoraŭ unu glason kaj mi opinios spritaj la dialogojn de tiu televida fiserio. Necesas, ke mi enlitiĝu !

Mi iras tra la kuirejo por demeti mian glason, reloki la trikvarone malplenan botelon en la ŝrankon sub la lavkuvo kaj preni mian benzodiazepinon. Sur la kuireja tablo Leo lasis sian taskokajeron malfermitan ĉe la morgaŭa paĝo, kaj ankaŭ duoblan paĝon plenskribitan de prinotaĵoj verkitaj per sia mano. De kiom da tempo mi ne interesiĝis pri tio, kion ili faras en la lernejo ?

Jan Palach... tiu nomo revenigas min al miaj jaroj en la liceo. Tamen mi ne plu sukcesas scii precize kiam. Ĉio tio estas tiel malproksime.

Mi estis sufiĉe bona lernantino. Ne tiel brila kiel Bertrando, kiun mi ĵus konkeris kaj kiu iĝos mia edzo, sed mi persistis. Vola kaj merita, diris la instruistoj. En la startapogiloj por banala laborvivo.

Palach... mi memoras ! Mi revidas lian vizaĝon sur la foto, kiu ilustris la ĉapitron pri la konsisto de la blokoj orienta kaj okcidenta en mia libro pri historio en la fina klaso. Palach... mi memoras nun. Mi memoras pri lia ago, kiu fascinis min tiam. Mi demandas min, kie Leo trovis ĉiujn tiujn informojn. Li skribas multe pli bone ol mi en lia aĝo. Li similas sian patron. Li kapablos efike alfronti malfacilaĵojn.

« La ago de Palach estas nekomprenebla, escepta. Ĝi ne respondas al la komunaj etikaj valoroj. Ĝi estigas fortajn emociojn, multajn demandojn kaj polemikojn, malsamajn taksadojn. La unuj kondamnas lin, la aliaj gloras lin ».

Per tiu citaĵo de la Salesiana (*4) pastro Jindřich Šraj akceptas nin S-ro Bastiano hodiaŭ matene. Poste li silentas. Lia rigardo, kiel nia, direktiĝas al la sidloko lasita vaka de nia kamarado Leo, malantaŭ mi, dua rango, centra linio. Neniu el ni aŭdacas elparoli unu vorton. S-ro Bastiano mallonge sidiĝas, malfermas kartonan tekton kuŝantan sur sia skribotablo, eligas el ĝi amason da fotokopioj. Liaj gestoj estas ege malrapidaj, malkomponataj, milimetraj. Li leviĝas, pasas inter la vicoj, kaj lasas antaŭ ĉiu el ni ekzempleron de la dokumento, kiun li deziras ekkonigi al ni.

Mi neniam prenis tempon por paroli kun Leo. Mi povus klarigi nek kial, nek kiel ni pasigis kvin monatojn en la sama klaso, unu malantaŭ la alia, kaj tamen ne interŝanĝis pli ol tri frazojn de senlima banaleco. Bruna estas Leo, kun mezlonga hararo falanta sur la kolon. Li havas belajn malhelajn okulojn, kiuj donas al lia rigardo emocian profundecon. Mi ignoris lin. Dum la funebra ceremonio de lia patrino mi atente rigardis lin la unuan fojon. Mi estis kun miaj gepatroj. Ne estis homamaso. Ŝi nomiĝis Katerina. Mia patro konatiĝis kun ŝi kelkajn semajnojn antaŭe. Ilia renkontiĝo kostis al li dek kvin tagojn da suspendo. Li ne rekomencos sian laboron. Li diras, ke tio tute ne gravas. Mi samopinias kiel li. Ankaŭ mia patrino renkontis ŝin. Sabate matene en la enirsalono de la urbodomo. Katerina havis rendezuon. Ŝi prezentis sin ĉe la akceptejo tenata de mia patrino, deklaris sian identecon. Ŝi estis afekta, sobre ŝminkita, relative eleganta en iom eksmoda, sed bongusta, maristblua kompleto. Mia patrino ne atentis pri la ujo, kiun ŝi estis demetinta ĉe siajn piedojn. Ŝi ne komprenis tion, kio prepariĝis. La virino pene levis la ujon, malŝtopis ĝin, surŝprucigis sin per la rozkolora likvo, kiun ĝi entenis. Mia patrino restis kiel senmovigita, rigardante, nekredanta, la flamon subite eliĝi el la Zippo (*5).

En la momento, kiam la kalcinita korpo de Katerina elspiris la lastan spiron de jam de longe konsumita vivo, ŝarĝante la aeron per akraj odoroj de bruligita kadavro kaj benzinejo, Leo finverkis sian raporton. Li estis elektinta konkludi per citaĵo de Salesiana (*4) pastro. Peza silento regas en la klasĉambro, dum ni legas. Ne temas pri tia kompilaĵo de eltiraĵoj de dokumentoj kolektitaj en la reto, kiel la plejmulto el

ni pene akuŝis. Tio estas brila, preciza, strukturita, sed estas io alia : blovo, urĝa bezono juĝi pri la indiferenta kaj senĝena malhumaneco de nia tempo laŭ la eksterkutimaj faktoj, kiuj sekvas sin en nia historio, ŝarĝitaj per plena simbola trafpo. La taskofolion subskribis Leo Kervelaco. Filo de Katerina Kervelaco. Nia klaskamarado. Li estas malatenta. Iom tiaj ni ĉiuj estas.

*1 TER : Trajno Ekspresa Regiona, france TER, Train Express Régional

*2 Bescherelle : libro pri gramatiko, tre uzata en Francujo

*3 Larousse : fama franca vortaro

*4 Salesianoj de Don Bosco estas signifa romkatolika ordeno, kiu devene specialiĝis por laboro kun junularo. La ordenon fondis itala pastro Don Bosco en la jaro 1859 kaj nomis ĝin omaĝe al Sankta Francisko de Sales.

*5 Zippo : usona varmarko de fajriloj

Tiun rakonton el la retejo short-edition.com/fr/esperantigis Jean-Mary.

Recepto de kukurba kaj juglanda kuko.

Ingrediencoj

3 ovoj

100 g da sukero

250 g da faruno

1 saketo da bakpulvoro

80 g da butero

400 g da kukurbo

70 g da senŝeligaj juglandoj

Glazura sukero

Antaŭvarmigu la fornon je 160°.

Senŝeligu kaj tranĉu la kukurbon en kubojn. Metu ilin sur fornan platon kaj enfornu dum 30 minutoj, ĝis kiam ili estu fandiĝantaj. Pistu ilin per legommuelilo.

Antaŭvarmigu la fornon je 180°.

Haku ne tro maldike la juglandojn.

En salatujo, batu la ovojn kun la sukero, ĝis la miksaĵo blankiĝas. Aldonu la farunon, la giston kaj la fanditan buteron.

Aldonu la kukurban kaĉon, la juglandojn. Bone miksu.

Verŝu la preparadon en rektangulan muldilon, iomete oleitan kaj farunitan. Enfornu 50 minutojn.

Lasu la kukon malvarmiĝi antaŭ elmuldigi ĝin.

Ornamu per iomete da glazuro.

Mi mem ne pistas la pecojn de kukurbo.

Tiun recepton proponas al ni Gérard kaj Jeannine.